Gazeto Andaluzia

Andaluzio per si, por Hispanio kaj la Homaro

31-a Jarkolekto * Decembro 2017 * N-ro 107

ISSN 1576-0618



FUENTE PALMERA

Historio kaj geografio miksis popolojn

Gazeto Andaluzia
Fundada por D. José Garzón Ruíz, en San Fernando (Cádiz) en 1910.
Órgano oficial de la **Asociación Andaluza de Esperanto.**

EDITA: Asociación Andaluza de Esperanto
REDACCIÓN: C/ Anfora 6 5-D 29013 Málaga (Hispanio)
DEPÓSITO LEGAL: MA-1136/86. ISSN: 1576-0618.
IMPRIME: Litopress SL Córdoba

DIRECTOR: Ángel ARQUILLOS LÓPEZ
REDACTOR: José María RODRÍGUEZ HERNÁNDEZ
COLABORADORES: Alejandro BURGOS ESCALANTE
Vicente HERRERO COBOS
Vicente MANZANO ARRONDO
Carlos SPINOLA

ENHAVO

Esperanto en Andaluzio 3
Juan de Lepe, la ne-daŭra reĝo de Anglio 9
Lingva Angulo 11
Poezia Angulo 16
Turismi en *Fuente Palmera* 18
Paĝoj pri nia Historio 22
Flamenko 26
Misteroj kaj legendoj de Andaluzio 27
Krucvortenigmo 30
Humuro 33
Lastmomenta informo 34

Noto: pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem.
La redaktoro rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn.



ESPERANTO EN ANDALUZIO



Pri allogo, instruo kaj esploro.
Esperanto en Sevila grupo



Vicente Manzano-Arrondo (Viko)

Vi scias, la edukada jaro ne paŝas same kiel la natura. Oni salutas en septembro kaj ĝisas en junio. Fakte pri la institucia edukado preskaŭ nenio naturas. Pensu tion, kio okazas ĉirkaŭ la lingvo. La Edukada Ŝtata (kaj Regiona) Sistemo elspezas kaj elspezigas multe da mono, tempo, energio kaj rimedoj por nesukcese atingi, ke ĉiu lernanto scipovu la anglan. Fine, la rezultataj homoj serĉas amikojn, laboron kaj vivan senton ĉefe en sia lando, kie la gepatra lingvo sufiĉas; aŭ koplodas fari ion en la internacia labora merkato; klopodado kiu kutime rezultas duonsukcesa, ĉar verdire oni malfacilege regos la anglan. Alivorte, oni malofte venkos en konkuremo kun denaskaj angloparolantoj, kiuj jam sufiĉe regas sian propran lingvon.



Fakultato en la Universitato de Sevilo

Meze de tia stultaĵo, oni povas akcepti iom da saĝeco kaj preni Esperanton kiel solvon. Ne temas nur pri lingva solvo, inteligenta uzo de la komuna mono, aŭ ŝparo de amaso da tempo kaj vivenergio... Temas ĉefe pri la rajto vivi sane. Pro tia stulta lingva politiko, la socio malsaniĝas; la homoj suferas; kaj la promesita premio, kiu meritigas la penon, ne alvenas.

Ĉe la urbo Sevilo, miksante fundamentan frenezon, Esperantan popolon kaj universitatanojn, stariĝis grupo de aktivuloj en la fino de 2016. Per ĉi tiu sama revuo ni jam informis pri niaj agadoj, realigitaj per seminarioj, afiŝoj, prelegoj ktp, dum 2016/2017. Lasu min nun rakonteti pri tri flankoj kiuj reprezentas nian agadon dum la ĵus finiĝita edukada jaro 2017/2018.




Lernantoj kaj profesoroj en la kurso de Esperanto okazinta en la Universitato de Sevilo. Kurso 2017 / 2018

Jen la unua agado. Ni atingis agnoskon de la Universitato de Sevilo por apogi universitatan kurson pri la instruo de Esperanto kiel lingvo. La agnosko inkludis, ke ĉiu studento kiu sukcese finiĝos, atingos 6 eŭropajn universitatajn kreditojn. La kurso okazis en la Fakultato pri Psikologio, dum la tuta akademia jaro, semajne po 2 tagojn. 20 uloj aliĝis. 12 finiĝis. 3 el ili partoprenis en la IJK de Badahozo kaj 2 el tiuj lastaj (Ana Gómez kaj Elena Blandino) estis eĉ stipendiataj de la junulara sekcio de HEF. La atingita celo de la stipendio estis instrui ilin pri egaleco, ĉefe ene de la movado, kaj igi ilin

zorgantoj pri bona konduto (nome respektemo al ĉia identeco). Dum la kurso, la partoprenantoj ĝuis plurfojan rilaton kun ĝemela agado el Pollando, gvidata de Marian Zdankowski.

Instruis Pepe Roldán, Antonio Rodríguez kaj Fernando Estepa el la Sevila Esperanta Asocio, Huandi (Juan Diego Díaz) kaj Viko (Vicente Manzano-Arrondo) el la Universitato de Sevilo. Eduardo Iriarte, ankaŭ de la Sevila Asocio, kaj Giĝermo Molleda, profesoro pri ekonomio de la sama universitato, respondecis pri pluraj flankoj de la informatika apogo al la kurso. Auxiliadora Cárdenas, sekretario de la departamento de Eksperimenta Psikologio, realigis ĉion, kio administrative estis necesa, kaj pli. Eĉ esperantistoj el Usono, Japanio kaj Koreio sendis filmetojn por brakumi la partoprenantojn.



Giĝermo Molleda estas la nuna zorganto pri la dua universitata kurso, kiu paŝos dum la jaro 2018/2019. La kurso ŝanĝiĝas kaj profitas kelkajn eblojn, kiel la rimedon faciligata de Duolingo por miksi ĉeeston kaj neĉeeston.

Kvankam kursoj pri Esperanto kutime elstaras intereson (eble nur en Esperantujo), aliaj agadoj povas malfermi kaj profiti ankaŭ aliajn pordojn. Mi mem estas respondeculo pri du studobjektoj kadre de la universitataj studoj pri psikologio:


Kvanta metodologio (ĉefe statistiko) por studentoj de la unua jaro, kaj kvalita metodologio (intervjuoj, analizado de diskursoj ktp) por studentoj de la lasta jaro. Ĉiujare la studentoj lernas metodologion samtempe esploras, ĉar la enhavo de la studobjektoj estas scii kiel bone aranĝi esploradojn pri la homa konduto. La plej junaj, kiuj partoprenis la kurson pri statistiko, helpis kolekti intervjuojn per enketo. Rezulto:

Pli ol 400 studentoj pri sociaj sciencoj respondis demandaron pri la angla, Esperanto kaj lingva justeco. Ne nur mi gvidis la esploron, sed ankaŭ Xavier Alcalde, ekde la Universitato de Florencio.

La rezultoj estas interesaj, sed troaj por klarigi en ĉi tiu spaco. Ekzemple, oni rimarkas, ke la intervjuatoj troigas kiam kalkulas la kvanton de homoj kiuj scipovas la anglan. Tiu troigo atingas la kvaroblon en kelkaj kazoj. Alivorte, la diskurso pri la "fina venko" de la angla estas tiom sukcesa, ke la homoj sentas, ke verŝajne preskaŭ ĉiuj jam scias sindefendi per tiu lingvo. La eŭropaj oficialaj datumoj parolas klare male. La scipovo pri la angla estas pli escepto ol normo, en preskaŭ ĉiu eŭropa ŝtato (krom skandinavajn landojn kaj Nederlando).

Krom tia surface priskribita sperto, pli interesa estas tio, kio okazis en la dua studobjekto. Mi klarigos rapide sed sufiĉe, ĉar oni meritas fieri pri la rezulto.

La unuan tagon de la kurso pri kvalita metodologio, mi demandis al ĉeestantaj 80 studentoj "Kio estas Esperanto?" 79 respondis, pli-malpli, "Esperant... kio?". La nura cetera klare konkludis "Jes! Mi scias! Temas pri tia fiaska lingvo!". Vi rimarkos la postan ŝanĝon.



La saman tagon mi prezentis la aferon pri kiu ni ĉiuj esploros dum la kurso: Lingva subpremado, kiu siavice inkludas la koncepton lingva justeco, kaj la ĉirkaŭaĵoj de la angla kaj Esperanto. Por bone esplori oni devas scii pri la enhavo. Pro tio, 80 studentoj lernis pri Esperanto. Kiel?

Ili esploris kaj aranĝis komunan dosieron. Duono el ili skribis, kaj la alia duono kontrolis la tekston. La rezulto ne estas speciale bona. Ne gravas. Gravas ke 80

studentoj esploris kaj lernis pri Esperanto kiel lingvo, historio, kulturo, komunumo ktp. poste, ĉiuj esploris. Ekzemple, kelkaj intervjuis homojn kiuj ne timas pri sia labora stabilo. Demandoj: "Priskribu normalan laboran tagon" "Diru al mi kiam kaj kiel vi partoprenas komunikan sperton, kiel legi dokumentojn, paroli kun klientoj ktp".

Krom unu el intervjuatoj, la ceteraj nur bezonas la hispanan por sia laboro. Ili neniam sentas bezonon uzi alian lingvon. Tamen, kiam la intervjuo daŭris per la sekvanta demando, la sinteno klare ŝanĝiĝis "Nun, ĉu vi povas klarigi kiel la angla gravas aŭ ne gravas?" La reagoj estis pli-malpli "Kiel! La angla? Tuuuute necesa! Nepre lernenda! Oni ne povas vivi, labori, pasi unu tagon sen scipovi la anglan!".

Tia duflanka reago klare montras, ke la diskurso pri la angla tute sukcesis, tiom ke superas la realon, la rektan sperton. Post la kurso, mi demandis al studentoj pri kiom da homoj, kiuj nenion aŭ preskaŭ nenion sciis pri Esperanto, ili tuŝis (informis, instruis, klarigis...). Averaĝe la respondo estis 4. Do, se vi kalkulus, la sperto faciligis ke ĉirkaŭ 400 homoj lernis pri kio estas Esperanto kaj sia grava rolo.

Kompreneble, tiaj spertoj ne rekte ŝanĝas la mondon, sed iomete helpas disvastigi la ĝustan scion pri... kiel diri?... *la saĝa eblo.*

Fine, la Sevila grupo partoprenis, stimulis, allogis... iom pli ol la ĝisnuna rakonto. Ekzemple, Huandi prezentis Esperanton al multaj lernantoj de malaga mezlernejo kaj respondecis pri grava esplora dosiero mendita de la *Esperantic Studies Foundation* (ESF). Tiu informo, pri la stato de Esperanto en la universitatoj, estis la bazo por la komuna diskuto, kiu okazis ĉe la Nitobe Simpozio en Lisbono, tuj post la fermo de la UK 2018 en la sama urbo. La Stipendio "Felipe González del Pino" elektis Vikon por partopreni en la Interlingvistikaj Studoj en la Universitato Adam Mickiewicz el Pollando, kiu faciligegas lin plibonigi la agadojn. Ĉefe Huandi kaj Eduardo Iriarte aranĝis la utilan retpaĝon kunagade.org, kiu povas elstarigi kiel sukcesa rimedo por helpi Esperantajn movojn. Kaj tiel plu.

Estas bona momento. Neniu el ni parolas pri la fina venko. Sed kiel rezisti la tenton pensi pri la Meza Sukceso? Ĉiukaze, ni ĝuas la vojon. Estis ege bona elekto eniri en Esperantujo. Ĉu ne?

La Prezidanto de *Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko* vizitis Sevilon.



En la monato julio vizitis Sevilon la Prezidanto de ELNA (Esperanto-Ligo por Nord-Ameriko) S-ro Orlando RAOLA. Li ĉeestis prelegon pri "*Opresión Lingüística y Estrategas de Liberación*" (Lingva Premado kaj Liberig-strategioj), post la prelego li respondis demandojn de la ĉeestantoj. La tago finiĝis per vizito al la urbo akompanita de sevilaj geesperantistoj.

aeu
Andaluzia Esperanto - Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

JUAN DE LEPE,
la ne-daŭra reĝo de Anglio

Alejandro Burgos Escalante. Teba (Malago)
José María Rodríguez. Kordovo

Ĉiuj landoj, ĉiuj regionoj kaj ĉiuj urboj havas tiun specialan areon, foje eĉ imaga, kies enloĝantoj estas mokeme konsiderataj. Ĉi tiu kutimo ne estas aktuala, jam en la verko *Philogelos*, la kompilo de ŝercoj pli antaŭe konata, verkita en la klasika grekva lingvo en la 4-a jarcento p.K., kvarono el la 265 ŝercoj rakontas mokeme spritaĵoj pri la enloĝantoj de la urboj *Cime* kaj *Abdera*.



La angla reĝo
Henriko la 7-a
(1457 – 1509)

En Andaluzio tiu speciala urbo estas Lepe, (*Lepo* en esperanto), en la provinco Onubo. Tamen, oni devas averti, ke la stupideco montrata per la *"lepaj ŝercoj"* estas tute fikcia, ĉar Lepo estas unu el la plej laboremaj vilaĝoj en nia lando. Tie, la agrikulturo, la turismo kaj la fiŝ-kaptado estas la ĉefaj viv-rimedoj de la lepanoj, kiuj reale tute ne estas kiel oni rakontas pri ili en sen-nombraj anekdotoj kaj ŝercoj.

Elstaraj lepanoj estis Rodrigo Pérez de Acevedo, la unua maristo kiu vidis amerikan teritorion, kvankam kelkaj historiistoj asertas, ke li certe naskiĝis en Sevilo. Mokeme oni diras pri li, ke Rodrigo vidis la amerikan insulon *Guanahani* -la unua Amerika teritorio eltrovita de la ekspedicio de Kristoforo Kolombo en la jaro

1492- dumnokte ! Alia elstara lepano estis Juan de Lepe, kiu estis reĝo de Anglio nur dum unu tago. Hodiaŭ ni rakontas lian historion.

Juan de Lepe (prononcu *Ĥuán de Lépe*) estis maristo kiu naskiĝis en Lepo, ĉe humila familia, je la mezo de la 15-a jarcento. Multaj ŝip-vojaĝoj kaj nombraj aventuroj en hispanaj kaj eŭropaj havenoj faris lin esti miksaĵo inter fripono, tromp-ludisto kaj ŝercemulo. Tiuj vojaĝoj irigis lin resti en Britio kaj kvankam oni konas nek la kialon, nek la momenton, li finis en la kortumo de la reĝo Henriko la 7-a, tie li estis kvazaŭ bufono kaj konfideculo de la reĝo.

La reĝo estis laŭfame lerta kart-ludanto, kvankam ankaŭ estis tre konata la fakto, ke li estis ege avara kaj pro tio liaj vetoj konsistis nur en kelkaj sen-valoraj moneroj. Unu tago okazis, ke li altigis la veton, la reĝo sendube estis tute certa, ke lia kartoj estus la plej bonaj sur la tablo. La reĝo vetis ĉiujn enspezojn produktitajn dum unu tago en la reĝ-lando kaj ankaŭ la jurisdikcion sur la regno-lando. Juan de Lepe, kiu ĉeestis tiun kart-ludon, akceptis kaj, kiel bona kaj lerta lepano, li gajnis la veton.

Do, Juan de Lepe, pro gajnita veto al Henriko la 7-a, fariĝis reĝo de Anglio dum unu tago. Oni diras, ke li profitis tiun tagon por organizi grandan feston, li ankaŭ plenumis siajn poŝojn kaj li ricevis donace kronon de la propra Henriko la 7-a, li ankaŭ ricevis la nomon de la "Ne-daŭra Reĝo" Kiam Henriko mortis en la jaro 1509 Juan decidis reveni en Lepon, li ne multe fidis pri la nova reĝo, Henriko la 8-a. Kiel riĉa homo Juan kontribuis al la subtenado de la monaĥejo *Nuestra Señora de la Bella*, kies figuro ricevis la kronon donacita de la angla reĝo. Post lia morto li estis entombigata ĉe la monaĥejo, tamen post pluraj modifoj de la konstruaĵo la tombo ne plu ekzistas.

Verdire, estintece la klasika Plutarko jam diris: Kelkfoje ŝerco, anekdoto, malgrava momento povas difini al ilustra homo pli bone ol heroaĵoj aŭ la plej sangemaj bataloj"

Lingva Angulo

La Refleksiva Pronomo SI



Laŭ *Plena Ilustrita Vortaro*, SI estas refleksiva pronomo, uzata por la tria persono kaj reprezentanta la subjekton de la laste esprimita ago. Sur alia numero de nia revuo ni jam parolis pri la pronomo SI, tamen ni denove deziras pritrakti ĉi temon, ĉar rilate hispan-lingvanojn ofte okazas eroroj dum la uzado de ĉi tiu pronomo.

Ni vidu jenan ekzemplon en la hispana lingvo:

- *El profesor pidió al alumno que trajera su libro.*

La lernanto esas preta plenumi la peton de la profesoro, tamen li devis demandi: *Pri kiu libro temas?* Ĉu la profesoro petis la libron apartenanta al si mem aŭ reale temis pri la libro de la lernanto?

En la hispana lingvo tiu frazo estas konfuza kaj estas tute ne eble koni ekzakte pri kiu libro temas. Tiel se ni uzas la hispanan "SU" ni ne povas koni ĉu temas pri aĵo / afero apartenanta al unu aŭ al alia homo. En esperanto tio ne okazas dank'al la pronomo SI.

Do, lernu la unuan regulon nun proponata:

Se la subjekto estas tripersona, ĉu singulara, ĉu plurala, la aparteno de io al tiu subjekto devas esti esprimata per la poseda pronomo SIA. Alie, se la objekto NE apartenas al la subjekto ni uzu: LIA-ŜIA-ĜIA-ILIA.

Ni vidu jenajn ekzemplojn:

- La profesoro petis al la lernanto alporti SIAN libron.
  El profesor pidió al alumno traer su libro (del profesor)

SIA, rilatas al la subjekto, do la libro apartenas al la profesoro.

- La profesoro petis al la lernanto alporti LIAN libron.
  El profesor pidió al alumno traer su libro (del alumno).

LIA, rilatas al la alparolato (ne al la subjekto), do la libro apartenas al la lernanto.

- Helena parolis al la ĉeestantoj pri siaj aventuroj en la praarbaro.
  Helena habló a los asistentes acerca de sus aventuras en la selva.
  (Temis pri la aventuroj de Helena mem).

- Helena parolis al la ĉeestantoj pri ŝiaj aventuroj en la praarbaro.
  Helena habló a los asistentes acerca de las aventuras de ella (otra persona, otra mujer) en la selva.
  (Ĉi tie, ne temas pri la aventuroj de Helena, sed de alia virino, pro la fakto ke *"ŝia"* tute ne rilatas al la subjekto.

- Li renkontis sian amikinon surstrate.
  Él se encontró con su amiga en la calle.
  (Temas pri la amikino de la subjekto Li).

- Li renkontis lian amikinon surstrate.
  El se encontró con la amiga de él en la calle.
  (Ne temas pri la amikino de la subjekto Li, sed pri la amikino de alia homo)

- Klara edziniĝis kun sia multjara fianĉo.
  Ella se casó con su novio de muchos años.
  (Temas pri la multjara fianĉo de Klara)

- Klara edziniĝis kun ŝia multjara fianĉo.
  Klara se casó con el novio de muchos años de ella (otra mujer).
  (Temas pri la multjara fianĉo sed ne de la subjekto Klara, sed de alia virino).

Alia grava lernenda regulo estas:

Kvankam SI rilatas ĉiam al la subjekto, SI povas nek esti mem subjekto, nek parto de la subjekto mem.

Do, oni ne povas diri:

- Li kaj ~~siaj~~ amikoj ĉeestos la feston morgaŭ.

La ĝusta frazo estus:

- Li kaj liaj amikoj ĉeestos la feston morgaŭ.
  Él y sus amigos asistirán a la fiesta mañana.

Atentu, ne konfuzu la subjekton se oni ŝanĝas la ordon en frazo, tiel:

- Li kun siaj amikoj ĉeestos la feston

Ĉi tie, "kun siaj amikoj" tute ne estas subjekto sed komplemento, malgraŭ la fakto, ke ni lokigis ĝin apud la reala subjekto LI. Tiel, ni povus ŝanĝi la ordon por klarigi la aferon:

- Li ĉeestos la feston kun siaj amikoj.

Sciu ankaŭ, ke SI ĉiam rilatas al la tria persono en la subjekto. Do, se ni uzas MI-VI / NI-VI, tute ne povas diri SI en la frazo.

Ekzemple:

- Mi ne konas ~~sian~~ patrinon.

Ni diru:

- Mi ne konas lian / ŝian patrinon.

Kaj fine, ni parolu pri SI en pasivaj frazoj. Memoru, ke SI rilatas ĉiam, ĉiam al la gramatika subjekto, ankaŭ ĉe pasivaj frazoj, kvankam en ĉi tiuj frazoj la gramatika subjekto ne estas aganto. Ekzemple:

- Li estas amata de sia patrino.
  Él es amado por su madre (de él)

- Ŝi estas amata de ŝia fianĉo.
  Ella es amada por el novio de ella (no del sujeto)
  (Atentu, ne temas pri la fianĉo de la subjekto "ŝi", sed pri la fianĉo de alia virino. Do, ne facila am-rilato !

Ni vidu pliajn ekzemplojn en pasivaj frazoj:

- Li estos akompanata de siaj amikoj.
  Do, liaj amikoj akompanos lin.

- Li estos akompanata de liaj amikoj.
  Ĉi-kaze la amikoj de alia homo akompanos lin.

Ĉu vi kuraĝas praktiki ĉi gramatikan aferon?
Se jes, traduku jenajn frazojn:

- *Karlo no desea leer sus libros (los libros de Karlo).*
- *Karlo y Johano son buenos amigos, pero Karlo no quiere conocer a sus padres. (Los padres de Johano).*
- *Maria es amada por su madre. (Por la madre de María)*

- *Maria y Klara son amigas. Maria no es amada por su madre. (de Klara).*

Jen la solvoj:

1) Karlo ne deziras legi siajn librojn.
2) Karlo kaj Johano estas bonaj amikoj, sed Karlo ne deziras koni liajn gepatrojn.
3) Maria estas amata de sia patrino.
4) Maria kaj Klara estas amikinoj. Maria ne estas amata de ŝia patrino.

ALIĜU AL
Andaluzia Esperanto-Unuiĝo

Se Vi deziras kunlabori en la disvastigado de la internacia lingvo en Andaluzio, jen Via asocio.


Por aliĝi al AEU kontaktu kun: esperanto14@ono.com
Jara Kotizo: 20 € pagebla ĉe la jena konto:

- Banco BMN (eksa Caja General de Ahorros de Granada)
  ES80 0487 3225 1420 0000 6979

Okaze de la pago de la jara kotizo bv. informi pri la jenaj sciigoj:

- Nomo de la aliĝanto.
- Afero: Kotizo 2018

Poezia Angulo



La pasintan monaton januaron forpasis en Kordovo la poeto PABLO GARCÍA BAENA (1923 – 2018). Kune kun aliaj poetoj li kreis en Kordovo en la jaro 1947 la poezian revuon *Cántico*, per tiu nomo oni konis poste tiun grupon de poetoj influitaj de la *Generacio de 1927*, ĉefe de Luis Cernuda. La grupo sopiris pli stetikan poezion kie la sencoj devus ludi tre gravan rolon. En la jaro 1984 li ricevis la Premion "Princo de Asturio" pri Literaturo kaj la Ora Medalo de sia urbo Kordovo. En 1988 la Andaluzia Registaro nomumis lin "Preferata Filo de Andaluzio".

Omaĝe ni aperigas hodiaŭ poemon de Pablo GARCÍA BAENA tradukita en esperanton.

Nur via amo kaj l'akvo...

Nur via amo kaj l'akvo... Oktobro apud la rivero
banis la orajn grapolojn de l'vespero,
kaj tiu hatinda supreniranta luno, hela,
forpelanta la nigrajn violojn de l'ombro.
Mi marŝis perdita, pereita che maroj de deziro,
blindigita de la milda nebulo de via hararo.
De via hararo sufokanta mian voĉon en-ĝorge
kiam mi perdis mian buŝon en ĝiaj nebulaj horoj.
Nur via amo kaj l'akvo... La rivero, milde,
silentigis siajn murmurojn pasanta apud ni,
Kaj la tremita aero apenaŭ kuraĝis

movi la poplajn foliojn ĉe l' bordo.
Nur audiĝis, dolĉa kiel anĝela flugo
post tuŝeti per liaj flugiloj dormitan stelon,
la efemera kolizio kiu deziras fariĝi eterna,
de miaj lipoj en la viaj trinkante la vivon.
La pureco de viaj mamoj mordis mian bruston
kun la timida parfumo de du sovaĝaj lilioj,
de du lilioj balancitaj de naiva brizo
kiam la somero etendiĝas sian varmon tra la montetoj.
La noko pleniĝis per aromoj de cidonio,
kaj dume en miaj manoj via koro dormis,
perdita, karesanta, kiel lontana kiso,
La rivero sopiris...
Nur via amo kaj l'akvo...



Pablo García Baena ricevis la
Premion "Princo de Asturio" pri Literaturo
en la jaro 1984.

Turismi en ... FUENTE PALMERA (Kordovo)

Ne abundas en Andaluzio vilaĝoj pri kiuj oni konas precize la ĝustan momenton pri sia fondiĝo. Tio okazas nur rilate tiujn urbojn kreitaj dum la 18-a jarcento de la Markizo de *Ensenada* kaj Pablo de Olavide, dank'al la projekto krei novajn setlejojn en dezertaj zonoj de Andaluzio, per la alvenigo de mez-eŭropanoj. Unu el tiuj vilaĝoj en la provinco Kordovo estas Fuente Palmera.

Fuente Palmera oni fondis en la jaro 1768, sub la reĝado de Karolo la 3-a, kaj ĝi ricevis la oficialan nomon "Kolonio de Fuente Palmera", sur la loko ekzistis nur besto-trinkejo ĉirkaŭigita de palm-arboj, jen la origino de la nomo. La respondeculo de la projekto repopoligi tiun zonon observis, *ke oni povus alvenigi 300 koloniantojn, ĉar tie la tero estas frukto-dona, ne mankas akvo kaj oni povos starigi preĝejon.* La bavara koronelo Johann Kaspar Thurriege, je la servo de la hispana reĝo, estis la respondeculo pri la alveno de novaj enloĝantoj el Mez-Eŭropo, ili devis esti sanaj kaj katolikaj. Ĉiu familio ricevis sufiĉe grandan ter-pecon kaj kvankam la dek unuaj jaroj de la kolonio estis teruraj, ĉar la koloniantoj ne alkutimiĝis al la andaluzia klimato, la repopoligo estis sukcesa. La plejmulto el la familioj venis el germanaj landoj kaj Svisio.



Blazono de
FUENTE PALMERA

Por favorigi la alvenon de novaj enloĝantoj, ĉiuj ili ricevis avantaĝojn rilate la pagon de impostoj. Tiuj specialaj leĝoj por la koloniantoj, ne nur de Fuente Palmera, sed ankaŭ de similaj vilaĝoj kiel La Carlota, San Sebastián de los Ballesteros, La Carolina, La Luisiana, ktp, finiĝis en la jaro 1835.


La nuntempaj enloĝantoj de Fuente Palmera estas la rezulto de rasaj miksiĝoj dum jarcentoj, tamen ankoraŭ estas eble trovi en la vilaĝo nomoj tute germanaj, ekz: *Hans, Wic, Hilinger, Rossi...* Kaj se vi promenas tra la stratoj de la urbo, vi trovos blondajn kaj blu-okulajn homojn, tute germanaj.

Nuntempe Fuente Palmera estas aktiva vilaĝo, kies ekonomio baziĝas ĉefe sur la agrikulturo (cerealoj kaj olivarboj) kaj la bruto-bredado, tiel estas eble trovi porkaĵ-industriojn. En la lastaj jaroj Fuente Palmera estas konata kiel "*la vilaĝo de la fiançinoj*", pro la grava tekstila industrio produktanta nupto-vestaĵojn.

Monumentoj

La *malalta aĝo* de la Fuente Palmera malebligas la ekziston de antikvaj monumentoj. De la 17-a jarcento, momento kiam oni starigis la urbon, nur restas preĝejo, komuna grenejo kaj la urbodomo.

- Preĝejo de *La Purísima Concepción.*



Konstruita per videblaj brikoj, ĝi posedas du turojn ĉe la ĉefa enirejo. Dum la primitiva konstruo nur unu el la turoj estis starigata, la alian turon oni fin-konstruis en la jaro 1994.

- *El Pósito*

Temas pri la plej grava civila monumento. Konstruita ankaŭ per videblaj brikoj fare de la unuaj enloĝantoj en la 17-a jarcento. La celo de la konstruaĵo estis utili kiel komuna grenejo de la urbo. Ĉi tiuj unuaj monumentaj konstruaĵoj troviĝas ĉe la centra placo de la vilaĝo.

Festoj

Meze de la monato aŭgusto okazas la *"kolonia foiro"*, temas pri tipa andaluzia foiro.

- Danco de la frenezuloj aŭ de la urso.

Ĉe la kolonio de Fuente Palmera troviĝas 9 aliaj pli malgrandaj vilaĝetoj. Unu el ili estas Fuente Carreteros, kvankam baldaŭ ĝi fariĝos sendependa municipo. Ĉiu 28-a de decembro okazas la danco de la frenezuloj, aŭ de la urso, memore al la kristana festo de la Masakro de la Senkulpuloj. La naskiĝo de ĉi tiu festo troviĝas en Mez-Eŭropo, ĉar de tie venis la unuaj enloĝantoj de la vilaĝo. Aro da dancantoj fuĝas el terura urso, kiu fine estas ĉasita. Sendube ĉi tiu festo memoras la lukton de la enloĝantoj de Mez-Eŭropo kontraŭ la sovaĝaj ursoj, kvankam ĉi tie, en Andaluzio, ne estas eble trovi tiujn bestojn.



Dancado de la *frenezuloj* en Fuente Carretero
Fuente Palmera

- La Foiro de la Fianĉinoj.

Dum la lastaj jar-dekoj la tekstila industrio, rilate nupto-vestaĵojn, fariĝis pli kaj pli grava en Fuente Palmera, ĝis la punkto, ke ĝi estas konata kiel la *"vilaĝo de la fianĉinoj"*. La negoco ampleksiĝis

ĝis ĉio rilata al la organizado de geedziĝoj. Tiel, ĉiuj jaroj okazas en la vilaĝo speciala semajno kiam oni organizas mod-paradojn, meze de la stratoj, por prezenti la plej allogajn vestaĵoj por tiuj specialaj ceremonioj. Ĉi tiu industria foiro estas nuntempe la plej grava okazintaĵo en la urbo

Gastronomio

Per faruno, ovoj, akvo kaj salo oni preparas la *socorrías*, fritaĵo kiu necesas tre malmultekostajn produktojn, do ĝi estis la bazo por la nutrado dum epokoj kiam la riĉeco ne abundis.

Mondfama estas la kapr-fromaĝo de Fuente Palmera, kies produktoj eĉ atingis internaciajn premiojn. Bongustaj ankaŭ estas ĉiuj porkaĵoj ĉi tie ellaborataj.

Venont-numere TURISMI EN ....

MACAEL (Almerio)

Ĉu Vi deziras kunlabori kun la revuo?

Ne hezitu sendi Viajn kunlaboraĵojn: artikolojn, desegnaĵojn, informojn, ludojn….


Gazeto Andaluzia estas la plej veterana esperanto-publikigaĵo en Andaluzio, tamen ĝi fariĝas tagon post tago kaj Via kunlaborado estas nepra.

Kontaktu kun: esperanto14@ono.com

Paĝoj pri Nia Historio

Notoj pri Esperanto kaj Andaluzio

Francisco Azorín Poch, la elstara matematikisto



Kiam ni legas pri la esperantismo de Francisco Azorín, ni ĉiam memoras tiun aktivan kordovan samideanon, arkitekto, verkanto de pluraj E-libroj, socialisma deputito, kiu post la hispana intercivitana milito ekziliiĝis kun sia tuta familia en Meksikio, tie li eĉ kunlaboris en la revivigo de la E-movado en la tuta Centr-Ameriko.

Tamen, alia Francisco Azorín ekzistas en Esperantio kaj ni parolos pri li ĉi-numere.


FRANCISCO AZORÍN POCH estis la plej aĝa filo de tiu karmemora arkitekto kiu tiome disvastigis la internacian lingvon en Kordovo. Kvankam la familio loĝis en Kordovo, tie la patro laboris kial municipa arkitekto, Francisco Azorín Poch naskiĝis en la urbo Malago, pro la fakto ke la familio de Carmen Poch, patrino de nia ĉefrolulo, loĝis tie. Tio okazis en la jaro 1914.

Franciso Azorín Poch ekkontaktis kun esperanto hejme. Kiam li estis apenaŭ infano, lia patro jam estis aktiva esperantisto, verkisto, prelegisto, movadano, partoprenanto en kongresoj, ktp. En Kordovo loĝis ankaŭ Joseph Ferdinand Berger Knöll, do la arkitekto Azorín Izquierdo petis al ĉi tiu ĉeĥa samideano instrui la internacian lingvon ne nur al sia plej aĝa filo Francisco, sed ankaŭ al tiuj kiuj naskiĝis poste: Manuel kaj Ángel.

En la jaro 1924 li ekstudis en la Publika Gimnazio de Kordovo. La profesoroj elstaris lian grandan laboran kapablon kaj lian deziron studi naturajn sciencojn, ĉefe biologio. Li tiom sukcesis en la Gimnazio, ke en la jaro 1928 oni elektis lin, kune kun aliaj lernantoj kaj la profesoro Juan Carandell -ankaŭ esperanto-parolanto- por vojaĝi en Monakon kaj tie viziti la Oceanografian Muzeon.

En la jaro 1930, 15-jaraĝa, li atingis premion en nacia konkurso pri literaturo por junuloj. En sia verketo Azorín Poch montras sin kiel natur-amanto kaj pacisto. Li skribis:

"Kio okazus se ni, la junuloj, dezirus ne partopreni en militoj, en la armeoj, en la kruelaj agadoj, en la deziroj regi niajn apudulojn kaj male, ni dezirus labori cele la amon al la Naturo, al la laboro kaj al la paco?"




Laŭkilometra bileto de la Familio
AZORÍN POCH. Sur la supra foto starigita dekstre aperas
Francisco Azorín Poch

En la jaro 1931 li komencis siajn studojn en la Universitato de Madrido. Li sekvis du karierojn: teknika arkitekturo kaj matematiko. Li ankaŭ ĉeestis klasojn pri ĥemio. En Madrido li loĝis en la prestiĝa

Studenta Rezidejo. Dum siaj matematikaj studojn li eltrovis la statistikon kaj li tuj decidis dediĉi siajn tutajn energiojn al ĉi tiu matematika fako.

La civitana milito haltis la studojn de Francisco Azorin. Lia tuta familio savis siajn vivojn, dank'al la somera restado de la familio Azorín en Malago. Jam 22-jaraĝa, Francisco Azorín Poch aliĝis al la respublikana armeo kiel artileria leŭtenanto. Kiam la milito finiĝis liaj gepatroj kaj fratoj sukcesis iri per-ŝipe en Meksikion, tamen la juna Francisco estis arestata kaj enkarcerigata. Post sia liberigo li sukcesis fini siajn matematikajn studojn en la jaro 1943 kaj nur unu jaro poste li aprobis publikan konkurencan ekzamenon por labori kiel ŝtata statikisto. Francisco Azorin atingis la unuan pozicion en tiu ekzameno, pro tio li, krom sia laboro kiel statikisto, fariĝis ankaŭ help-instruisto en la Universitato de Madrido.




En la jaro 1953 li doktoriĝis pri Matematiko kaj ekde tiam li kunlaboris kun UNESKO cele la disvastigon de statistiko en Latinameriko. Li instruis en la Centra Universitato de Venezuelo kaj tie li publikigis sian unuan libron, ekde tiam tiu verkaĵo estis tutmonda referenco rilate statistikon. En 1958 li revenis en Hispanion, Francisco Azorín Poch ĉiam asertis, ke li estis mond-civitano kaj tio estis ebla dank'al siaj poliglotaj kapabloj, tiel li parolis, krom la hispanan lingvon kaj esperanton, la anglan, la germanan, la rusan kaj la araban lingvojn. Krome, li neniam forgesis sian emon studi botanikon kaj ornitologion.

En la jaro 1961, post nova restado en Venezuelo, li fariĝis profesoro pri matematika statistiko en la prestiĝa Universitato de

Santiago de Compostela kaj en 1963 la Komisio Ekonomia por Latinameriko de Unuiĝintaj Nacioj en Ĉilio nomumis lin ĉefon de la statistika fako.

La pinto de lia scienca kariero okazis en la jaro 1977, tiam la unua demokratia registaro en Hispanio post la morto de la ĝeneralo Franco, nomumis lin Prezidanton de la Nacia Instituto pri Statistiko kaj por honorigi sian universiatan karieron la Universitato de Malago, la urbo kie Francisco Azorín Poch naskiĝis, atribuis al li honoran doktorecon.

Rilate esperanton, li estis dumviva membro de la Universala Esperanto-Asocio kaj membro de la Akademio Internacia de la Sciencoj, universitatnivela esperantlingva institucio en San Marino. Francisco Azorín Poch ankaŭ kunlaboris de tempo al tempo kun esperant-lingvaj revuoj. Li forpasis en Madrido en la jaro 1989, kiam li estis 74-jaraĝa.




Strato Claudio Marcelo en Kordovo, komence de la 20-a jarcento.
Tie loĝis Francisco Azorín Poch ĝis la jaro 1931.

F L A M E N K O

Bulerioj

Sur ĉi tiuj paĝoj dediĉitaj al la flamenka arto, verŝajne ni komprenigis, ke la flamenka kantado naskiĝis kun la celo diskonigi la suferadon de popolo (malsato, premo, malamo, ktp.), kune kun siaj deziroj pri pli esperiga estonteco. Tamen, ofte, tiu suferanta popolo ankaŭ profitis la kantadon por montri siajn plej plen-ĝojajn momentojn.



Buleria Festo en Jerezo

La unua kant-stilo por montri tiujn ĝojecon estas la bulerioj. Rilate la vorton, ĝi eble devenas de la hispana *"bulleria"* kaj siafoje ĉi tiu devenas de *"bulla"* (bruado). Ĉi tiu kant-stilo naskiĝis en Jerezo, kvankam ankaŭ ekzistas stiloj konataj kiel Bulerioj de Kadizo, de Lebriho, de Utrero kaj eĉ la Bulerio de Triano.

Unuamomente, ĝi estis la fina kantaĵo okaze de flamenkaj festoj. Tiam ĉiuj partoprenantoj lokiĝis ĉirkaŭ centra punkto kaj tie, ĉiuj ili, unu post la alia, stariĝis meze por kanti aŭ danci. La bulerioj posedas rapidan ritmon kaj ili estas akompanataj de aklamado kaj rapida aplaŭdado de tiuj kiuj estas apud la kantistoj aŭ la dancisto. Pri la tekstoj de la kantaĵoj, ili ĝenerale temas pri tri aŭ kvar ok-silabaj versoj.


Jen bulerio de *Joaquín el Zambo.*

Mi amis vin, tio ja estas vera
mian amon ne povas mi nei.
Tio kion mi bedaŭras
estas, ke mi konis vin.

Ĉe l'pordo apud via patrin´
via patrin' ŝajnas esti sun'
Vi la Virgulin' de l' Karmen.
Mi freneziĝas ĉar mi ne scias
ĉu la django beligas vin
aŭ vi beligas la djangon.

Misteroj kaj Legendoj de Andaluzio

L'oldulino de l'oleo-lampo




Okazis en Sevilo, en la jaroj dum kiuj reĝis la "justa" reĝo Petro la 1-a de Kastilio. En tre malhela nokto, unu el la plej malbelaj stratetoj de la urbo servis kiel tragika loko de malhonesta okazintaĵo. Du kavaliroj frapigis siajn glavojn kaj, post mallonga batalo, unu el ili falis kun la brusto vundita. Inter la sango, kiu estis sur lia lipo, la vivo foriris, kaj la animo aperis je lia lasta angoro:

-Je Dio! mi estas mortinta !

La rumoro de la luktado altiris tre bonan virinon al la fenestro, kiu rigardas la straton. Ŝi estas maljuna, faltita kaj osta, kaj ŝi provis, aperiginte sian vizaĝon, lumigi la scenejon per la malforta lumo de sia oleo-lampo. Ŝi povis vidi la mortanton, kies sangomakulita korpo tremis en siaj lastaj konvulsioj, kaj apud li la alia kavaliro en nigraj vestaĵoj staris prenanta sian glavon, plena je sango.

La murdisto rigardis per ombra esprimo al sia rivalo, kiam lia restis lumigita per la oleo-lampo de la scivolema maljunulino. Li rapide kovris sian vizaĝon kaj trankvile foriris, kiel senkulpa homo. Promenante, oni povas aŭdi la specialan bruon farita de liaj botoj kaj de aliaj ostoj, kiam ili interkoliziis. Tiu karaktera bruo devis aparteni al famega homo, ĉar la virino delasis la oleo-lampon, kiu mallumiĝis kiam frapis la plankon de la strateto, kaj ŝi subite fermis la fenestron.

La virino, enprofundiginte sian vizaĝon inter ŝiaj manoj, plorpetis:



- Savu min, Virgulino de la Reĝoj!

Ŝajnas, ke ŝi timas iun malfeliĉaĵon.

Tagiĝis kaj la urbestro de Sevilo, sinjoro Martín Fernández Cerón, malfermigis la fortajn pordojn, kiuj ĉirkaŭiras la urbon, kaj prezentis sin antaŭ la juna reĝo Petro la 1-a; li genuiĝis.

-Nu, -diris lia moŝto Petro- ĉu oni povas toleri tiom da maljusteco? Senviva homo aperas surstrate kaj ankoraŭ oni ne trovis kulpulon!

-Via moŝto, -diris la urbestro- miaj enketoj senutiliĝis. La afero estas treege mistera. Vi jam scias, ke judoj, maŭroj... En iliaj kvarteloj...Mi suspektas…

-Kaj kial suspekti? Ĉu vi ne trovis atestanton? Ĉu vi ne trafis la oleo-lampon? Serĉu la propietulon kaj postulu al li aŭ ŝi sciigi pri la kulpulo. Iru tuj se vi ne ŝatas, ke via kapo rulos.

La urbestro foriris tremiĝanta kaj la reĝo Petro iris malantaŭ li marŝanta direkte al turo, kiel li amuziĝis kun siaj falkoj. Poste, li ekrajdis. Kiam alvenis la nokto, li eliris per sekreta pordo, portanta nigrajn vestaĵojn. Je lia zono pendis lia plej bona glavo el toleda ŝtalo. Li vagadis sur malhelaj stratoj.

Samtempe, ĉe la malliberejo okazis drama sceno. La urbestro Cerón deklarigis la maljunulinon de la oleo-lampo, kiu, timigita kaj sen forto por paroli, tenis la buŝon fermita. La ekzekutistoj fivortumis kaj minacis ŝin, kaj knarigis timige la “ĉevalidon”. Malgraŭ ĉio, la

maljunulino nenion diris kaj per krioj kaj lamentoj ŝi plendis:

-Nenion mi vidis, nenion mi aŭdis. La oleo-lampo al mi en apartenas. Nenion mi scias.

-Konfesu, bona virino -postulis Cerón- Kiu estas la murdisto?

-Nenion mi scias -insistis la malfeliĉulino.

-Konduku ŝin al la torturejo -kriaĉis kolere la urbestro.

Ili preparis la hokojn kaj la bastonojn, kaj ili trenis ŝin ĝis la "ĉevalido". La ostoj de la virino terure krakis. Venkita pro la doloro, ŝi suspiris:

- Kompatu min… Lasu min… Tion mi diros.

La voĉo de la virino iĝis aŭdebla:

- Estis la reĝo, kiu mortigis lin….


Timema silento inundis la ejon. La nekonatulo antaŭeniris ĝis la centro de la ĉambro kaj malkovriĝis. Li estis Petro. Ĉiuj ĉeestantoj timiĝis. La reĝo antaŭeniris ĝis la atestanto kaj donis al ŝi sakon, kiu enhavis cent monerojn el oro.

-Tiu virino diris la veron. Tiu kiu diras veron, estas protektata de la ĉielo kaj justico. Nu, iru pace kaj nenion vi timu. Mi estas la murdisto de tiu homo. Sed al la reĝo nur Dio povas juĝi.

La justa reĝo volis agi ĝuste kaj li ordonis, ke oni loku ĉe la flanko kie la murdo okazis, figuron de la reala kapo, kiu ŝajnas en la malheleco la kapo de kondamnito.

El la origina verko "Leyendas de Andalucía" esperantigis:
Alehandro Burgos Escalante.

Nuda Krucvortenigmo




HORIZONTALE

A. En la francaj aŭtomobiloj.
B. Prepozicio montranta rimedon.
C. Inverse kaj sen la lasta vokalo, anĝelo de la plej alta rango.
Ĉ. Tuto de vazogarnituro, destinita por la manĝoj.
D. Sen la lasta vokalo, homparazita fungo.
E. Loko.
F. Ĉi tiu vokalo en la morsa kodo sonas kiel: - - -

VERTIKALE

1. En la svedaj aŭtomoviloj.
2. Adjektive, fabela estaĵo de malsupera rango, dotita per supernaturaj povoj.
3. Adverbe, granda terpeco kun arboj kiu troviĝas en urboj.
4. Transportsistemo funkcianta per radoj sur trakoj.
5. Denove unu movo en ia direkto.
6. Sen la lasta vokalo, kono.
7. Ronda vokalo.

Rebuso



Amerika sen-dependa ŝtato: _____

Solvo al la pasintnumera Vorta Piramido.

I
NI
ONI
FINO
MORFIN
INFORMO
FORMINGO


Solvo al la pasintnumera Rebuso.

Rompita de Spartako: ***KATENOJ***
(Sur la bidlo aperis kato ene de du literoj O, do: KAT' EN O-J)

Ĉu la revuo plaĉas al Vi? Ĉu Vi ŝangus ion?
Ĉu io aldonebla? Ĉu forviŝi ion?
Komentu kaj proponu per jena kontaktilo:

esperanto14@ono.com


HUMURO



LASTMOMENTA INFORMO !

Ĵus aperis nova libro eldonita de nia asocio. Temas pri *LA FONTANO DE L'SORTO.* Poemaro verkita de nia malaga samideano **Ángel Arquillos López.**

Ĉu Vi deziras aĉeti ekzempleron?
Kontaktu kun ni !



Prezo: 6 €
Paĝoj: 65
ISBN:
978-84-930304-8-3

La numero 108-a de nia revuo aperos dum la monato novembro 2018. Ni dankas Vian kunlaboradon, ĉar la eldonado de revuo nur estas ebla se ni ĉiuj kunlaboras. DANKON !

esperanto14@ono.com

GAZETO ANDALUZIA
Apartado de Correos 3142
14080 CÓRDOBA (Andaluzio – Hispanio)

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo
Asociación Andaluza de Esperanto

★

Andaluzia Esperanto-Unuiĝo estas la asocio kiu strebas al la disvastigo de la internacia lingvo Esperanto en Andaluzio.
Ĝi fondiĝis en la jaro 1984a danke al la iniciato de geesperantistoj de la provincoj Malago, Sevilo kaj Kordovo. Hodiaŭ apartenas kaj kunlaboras kun A.E.U. geesperantistoj de la tuta Andaluzio kaj eĉ ekster ĝi.

Estraro

Prezidanto : Angel Arquillos López
Vicprezidantino: Fátima Jiménez García
Sekretario: José María Rodríguez Hernández
Kasistino: María Dolores Torres Mateo
Voĉdonantoj: Jordi Lietor López
Antonio Rodríguez Gasch
Juan García del Río

Adreso: C/ Ánfora 6 5-D 29013 Málaga

E-Adresoj: angelarquillos@gmail.com
esperanto14@ono.com

TTT-paĝo: www.esperanto.ac
www.esperanto-andalucia.info
Blogo: www.andaluciaesperanto.blogspot.com

Aliaj utilaj adresoj de la Esperanto-Movado

* Universala Esperanto-Asocio
Nieuwe Binnenweg 176 NL-3015 BJ Rotterdam (Nederlando)
uea@inter.nl.net

* Hispana Esperanto-Federacio
C/ Rodríguez San Pedro 13-3-7 28015 MADRID (Hispanio)
admin@esperanto-es.net


71-a Internacia Fervojista
ESPERANTO-KONGRESO
03-a ĝis 09-a de majo 2019
MALAGO (HISPANIO)